

Protokolo de la estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo

ĵaŭdon la 18-an de marto 2021 per Teams

(aprobata en la interkonsiliĝo la 29-an de aprilo 2021)

Ĉeestis

Amelie Matt (Tromsø)

Jardar Eggesbø Abrahamsen (Trondheim)

Bård Hekland (Bergen)

Lars Sandbakk (Stavanger)

Mario Machlik anoncis nepartoprenon pro malsano. Herman Ranæs momente vizitis la kunvenon, sed ne povis partopreni. Claude Rouget forestis senanonce.

0. Tagordo

La tagordo estis dissendita la 14-an de oktobro. La tagordo aprobiĝis.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 25-an de februaro

La malneta protokolo estis dissendita la 26-an de februaro. La protokolo senŝanĝe aprobiĝis.

2. Jarraporto 2020

Ni trairis la jarraportan malneton. Bedaŭrinde ne estis faritaj ĉiuj korektoj. **Decido:** Lars aldonu informojn pri la kluboj de Bryne kaj Stavanger. Herman ĝisdatigu pri Legaco Uhlen. Claude aldonu komentojn pri la ekonomio. Tempolimo: la 22-an de marto.

La raporto poste estos sendita al Douglas por aperigo en Norvega Esperantisto.

3. Landa kongreso 2021

La tempo kaj daŭro estis jam deciditaj: La 5-an kaj 6-an de junio, maksimume de la 14-a ĝis la 17-a ambaŭ tagojn, kun leĝera vespera programo de la 19-a.

Novaĵo: Kim J. Henriksen konsentis koncerteti por ni vespere.

Decidoj: Bård invitos estraranon de UEA por aŭ salutmesaĝi je la malfermo, aŭ saluti vespere. Ĉiuj estraranoj pripensas kiujn aliajn gastojn aktualas inviti por la vespera programo, kaj raportos pri tio en la sekva estrara kunsido. Tagordo: Ni sekvos la tagordon de 2015, adaptita al la reta formato. Principe ni traktu estintecon sabate kaj estontecon dimanĉe, sed la finan tagordon influos ĉu estos ricevataj ampleksaj proponoj pri ŝanĝojn: 1. Kunvenformalaĵoj, 2. La jarraportoj 2018, 2019 kaj 2020, 3. La jarkalkuloj 2018, 2019 kaj 2020, 4. Ricevitaj proponoj, 5. Laborplano 2021–2023, 6. Elektaj: estraro kun anstataŭantoj; revizoro kun anstataŭanto; reprezentantoj de NEL en la estraro de Legaco

Uhlen, kun anstataŭantoj; reprezentanto en la domkomisiono, kun anstataŭanto; nova elekta komisiono, 7. Loko por la Landa Kongreso en 2023.

La kongreso estos anoncita en Norvega Esperantisto minimume du monatojn anticipe. Malnetan laborplanon ni finfaros en la sekva estrara kunsido, ĝin ni dissendos per NEL-diskut minimume unu monaton antaŭ la landa kunveno.

4. Nordia kunlaboro

Bård kaj Mario sekvas la diskutojn en intere.se kaj retroŝte inter la estraranoj de la skandinavaj asocioj. Estis levita propono pri komuna nordia gazeto, sed nenio konkretiĝis. La 17-an de aprilo rete prelegos Charlotte Scherping Larsson kaj Albert Stalin Garrido de TEJO. Bård petis, sed dume ne ricevis detalojn pri la prelego. La aranĝo estos anoncita en Facebook, en NEL-diskut, al niaj najbarlandaj asocioj kaj se eble en Norvega Esperantisto.

Ni ricevis informon de la dana asocio pri gastprelego de Ilona Koutny la 29-an de marto. Bård dissendos informojn pri la aranĝo.

5. Retejo de NJE

Judith transigis la paĝaron de NJE al la domajno de esperanto.no. La paĝaro estis tre nesekura kaj teĥnologie malnoviĝintaj, kaj kostus multe pagi por propra sekureca atesto. Havos aliron al la paĝoj ankaŭ la estraranoj de NJE.

6. Eventualaĵoj

Lars informis ke Heroo alportos al Oslo kvindekono da libroj de la heredaĵo de Anne Karin.

Lars ankaŭ raportis, ke li ricevis longan artikolon de afrikaj konatoj kiun li koncizigos por aperigo en Norvega Esperantisto.

La interkonsiliĝo daŭris de 20:30 ĝis 21:40.

La venonta interkonsiliĝo okazos ĵaŭde la 29-an de aprilo je 20:30 per Zoom aŭ Teams.

Protokolis Bård Hekland